

changements de statuts proposés en janvier 2010

mais dont le vote n'a pas été pris en compte
car la mise à l'ordre du jour de ce point a été contestée.

Rezolucio/Résolution 5

(statutŝanĝoj/ *modification des statuts*)

art. 10

unua modifo/ première modification

komitatano ne nepre estu franco/
pas de condition de nationalité

jes/*oui* ne/*non* sindeteno/*abstention*

dua modifo/ deuxième modification

estu 11 komitatanoj (anstataŭ 15)/ *11 membres
du Conseil d'Administration (au lieu de 15)*

jes/*oui* ne/*non* sindeteno/*abstention*
se vi voĉdonas nee, kiun alian nombron vi proponas?
si vous votez non, quel autre nombre proposez-vous ?

art. 11

simpligo de la estraro/ *simplification du Bureau*

jes/*oui* ne/*non* sindeteno/*abstention*

art. 12

perkoresponda voĉdono/ *délibération par correspondance*

jes/*oui* ne/*non* sindeteno/*abstention*

art. 13

ne pli ol 5 rajtigiloj/ *pas plus de 5 procurations*

jes/*oui* ne/*non* sindeteno/*abstention*

art. 15

simpligi la rekunvokadon/ *simplifier la reconvoction*

jes/*oui* ne/*non* sindeteno/*abstention*

Rezolucio/Résolution 6

(aprobo de la tuta teksto de la statuto kun supraj ŝanĝoj
se akceptitaj, inkluzive antaŭajn ŝanĝojn/ *approbation de la version
intégrale des statuts avec les changements ci-dessus s'ils sont acceptés, y inclus les précédents changements*)

jes/*oui* ne/*non* sindeteno/*abstention*

Teksto de la ĝis nun valida statuto legeblas kiel dokumento en la retejo <http://www.gresillon.org>. Eblas peti skriban version (franclingvan). Antaŭaj statutŝanĝoj estis akceptitaj de ordinara jarkunveno en 2001, sed statute utilas, ke eksterordinara membrokunsido validigu ilin kaj ke la novan tekston de la statuto oni oficiale registru okaze de la jura proceduro. *Le texte des statuts actuellement en vigueur peut être lu comme document sur le site <http://www.gresillon.org>. On peut en demander une version imprimée. Les précédents changements de statuts ont été acceptés par une Assemblée Générale Ordinaire en 2001, mais il est utile, statutairement, de les ratifier par une Assemblée Générale Extraordinaire, de sorte que le nouveau texte puisse être enregistré à l'occasion de la mise en conformité juridique.*

**STATUTS DE LA
SOCIETE COOPERATIVE
« MAISON CULTURELLE DE
L'ESPERANTO »**

*après modifications
(les modifications soumises au vote
sont en gras)*

**STATUTO DE LA
KOOPERATIVA SOCIETO
« KULTURDOMO DE ESPERANTO »**

*post modifoj
(la nun voĉdonataj modifoj
aperas graslitere)*

**TITRE UN
BUT et COMPOSITION de l'ASSOCIATION**

Article Premier

Il est constitué entre le comparant et les personnes qui adhèrent aux présents statuts, une Société Coopérative à Capital Social et à personnel variables, régis par la loi du 24 Juillet 1867 et la loi du 7 mai 1917, qui prend le nom de « MAISON CULTURELLE DE L'ESPERANTO » (dénomination légale : Maison culturelle des Espérantistes Français).

Sa durée est illimitée.

Le siège de cette Société est au Château de Grésillon-Pontigné (M & L). Il peut être transféré partout ailleurs en France par délibération de l'Assemblée Générale ayant compétence pour modifier les statuts.

**TITOLO UNU
CELO KAJ KONSISTO DE LA ASOCIO**

Artikolo Unu

Estas fondita inter la ĉeestanto kaj la aliĝantoj al tiu ĉi statuto, Kooperativa Societo kun socia kapitalo kaj varia dungitaro, laŭ la leĝo de 24a de Julio 1867 kaj la leĝo de 7a de majo 1917, nomata « KULTURDOMO DE ESPERANTO » (leĝa nomo: Kulturdomo de francaj Esperantistoj).

Ĝia daŭro estas senlima.

La sidejo de tiu Societo situas en Kastelo Grésillon-Pontigné (Departemento M&L). Ĝi povas esti translokita ien ajn en Francio pro decido de Membrokunveno kompetenta por modifi la statutojn.

Article Deux

Cette Société a un caractère éducatif et récréatif.

Elle observe dans ses réunions la neutralité la plus absolue dans les domaines politique et religieux.

Elle a pour but l'achat d'immeubles, de terrains, de matériel pouvant permettre la formation espérantiste et l'émancipation intellectuelle et sociale de ses membres.

Elle doit leur donner en particulier en leur fournissant la nourriture et le logement la possibilité :

1. de participer chaque année à des Ecoles espérantistes d'été, stages de formation des cadres, rencontres internationales, Congrès, etc.
2. d'étudier en commun les questions touchant l'enseignement et la propagation de l'ESPERANTO ;
3. de provoquer à la « Maison Culturelle de l'Espéranto », l'organisation de conférences et d'activités pratiques, éducatives, artistiques, techniques, susceptibles d'améliorer les connaissances de tous les participants ;
4. d'organiser les loisirs de toute la collectivité par des réunions amicales, des manifestations artistiques : théâtre, cinéma, concert...
5. de faciliter l'éducation physique des membres par la pratique des sports : basket-ball, tennis...

Un règlement intérieur déterminera la création et la gestion des commissions spécialisées à l'intérieur de la « Maison Culturelle de l'Espéranto » et définira leurs activités.

Artikolo Du

Tiu Societo havas edukon kaj distran karakteron.

Ĝi respektas, dum siaj kunvenoj, la plej absolutan neŭtralecon en la politika kaj religia kampoj.

Ĝi celas la aĉeton de bienoj, terenoj, materialoj ebligante esperantistan trejnadon kaj intelektan kaj socian liberigon de siaj membroj.

Ĝi donu, specife per provizo de nutrado kaj loĝado, la eblecon:

1. partopreni ĉiujare en esperantistaj someraj lerno-periodoj, trejno-periodoj de gvidantoj, internaciaj aranĝoj, kongresoj, ktp.
2. studi kune la punktojn kiuj rilatas al instruado kaj disvastigo de Esperanto;
3. instigi organizadon en Kulturdomo de Esperanto de prelegoj kaj praktikaj, edukaj, artaj, teknikaj aktivaĵoj, kiuj plibonigu la scipovojn de ĉiuj partoprenantoj;
4. organizi distraĵojn de la tuta komunumo per amikaj kunvenoj, artaj eventoj: teatro, kino, koncerto...
5. faciligi la fizikan edukon de la membroj per praktikado de sportoj: korbo-pilko, teniso...

Interna regularo difinos la kreadon kaj mastrumadon de la specifaj komisionoj ene de Kulturdomo de Esperanto kaj difinos iliajn agadojn.

<p style="text-align: center;"><u>Article Trois</u></p> <p>Le Capital Social minimum de la Société est fixé à la somme de 600 000 anciens francs.</p> <p>Il est divisé en 60 parts de 10 000 anciens francs chacune.</p> <p>Il pourra être indéfiniment augmenté par la souscription de nouvelles parts, soit par d'anciens, soit par de nouveaux sociétaires. La part qui permet de devenir membre de la Société est fixée à 16 Euros (soit 10 000 anciens francs). Elle ne rapporte pas d'intérêts.</p> <p>Pour être membre de la Société il faut non seulement être possesseur d'une part, mais être agréé par le Conseil d'Administration, après avoir été présenté par deux membres de la Société.</p>	<p style="text-align: center;"><u>Artikolo Tri</u></p> <p>La minimuma socia kapitalo estas fiksita je 600 000 malnovaj frankoj [validaj ĝis 1960].</p> <p>Ĝi estas dividita en 60 partoj po 10 000 malnovaj frankoj.</p> <p>Ĝi povos esti senfine kreskigita per aĉeto de novaj partoj fare de jamaj aŭ novaj societanoj. La parto, kiu ebligas fariĝi membro de la Societo estas fiksita al 16 eŭroj, depost la transiro al Eŭro [2001]. Ĝi ne donas interezon.</p> <p>Por esti membro de la Societo, oni ne nur posedu parton sed estu prezentita de du membroj de la Societo kaj sekve aprobita de la Komitato.</p>
<p style="text-align: center;"><u>Article Quatre</u></p> <p>Les parts ne pourront être cédées ou transmises sans autorisation du Conseil d'Administration.</p>	<p style="text-align: center;"><u>Artikolo Kvar</u></p> <p>Oni ne rajtas vendi aŭ transdoni partojn sen permeso de la Komitato.</p>
<p style="text-align: center;"><u>Article Cinq</u></p> <p>L'âge minimum des membres de la Société est fixé à 18 ans.</p>	<p style="text-align: center;"><u>Artikolo Kvin</u></p> <p>Membroj de la Societo devas aĝi minimume 18 jarojn.</p>
<p style="text-align: center;"><u>Article Six</u></p> <p>Tout sociétaire pourra démissionner en adressant sa démission au Conseil d'administration.</p> <p>L'Assemblée Générale peut exclure un membre dont la présence serait susceptible de nuire à l'activité de la Société, l'intéressé ayant bien entendu le droit de présenter sa défense devant l'Assemblée Générale.</p>	<p style="text-align: center;"><u>Artikolo Ses</u></p> <p>Ĉiu societano rajtas demisii adresante sian demision al la Komitato. La Membrokunveno rajtas ekskludi membron kies ĉeesto iel malutilas la agadon de la Societo, sed la koncernato rajtas kompreneble defendi sin antaŭ la Membrokunveno.</p>
<p style="text-align: center;"><u>Article Sept</u></p> <p>Lorsqu'un sociétaire vient à décéder, est interdit, mis en faillite ou se trouve en état de déconfiture, la Société n'est pas dissoute et continue de plein droit entre les autres sociétaires. Mais les héritiers du défunt, l'interdit, le failli ou ses créanciers, le sociétaire en état de déconfiture cessent de faire partie de la Société.</p>	<p style="text-align: center;"><u>Artikolo Sep</u></p> <p>Kiam societano forpasas, estas finance malpermesita bankrota aŭ nepagipova, la Societo ne estas malfondita kaj daŭras plenrajte inter la aliaj societanoj. Sed la heredantoj de la forpasinto, la malpermesito, la bankrotinto aŭ ties kreditoroj, la nepagipova societano ne plu estas membro de la Societo.</p>
<p style="text-align: center;"><u>Article Huit</u></p> <p>En cas de retrait d'un sociétaire pour quelque cause que ce soit, le sociétaire ou ses représentants ont droit au remboursement en numéraire des sommes versées sur le montant des parts qu'il a souscrites. Toutefois ce remboursement n'aura lieu que sous réserve de la part du sociétaire dans les pertes telles qu'elles résulteront du bilan qui suivra son départ.</p> <p>Pour le calcul de ces pertes, le sociétaire devra s'en rapporter au bilan tel qu'il aura été approuvé par l'Assemblée Générale. Le sociétaire qui se retire ne pourra ni faire apposer des scellés, ni faire procéder à un inventaire, ni faire nommer un séquestre, ni gêner en quoi que ce soit le fonctionnement normal de la Société. Il ne peut en aucun cas prétendre sur les réserves de la Société.</p>	<p style="text-align: center;"><u>Artikolo Ok</u></p> <p>Okaze de retiriĝo de societano ial ajn, la societano aŭ ĝiaj reprezentantoj rajtas je repago de la elspezitaj sumoj laŭ la valoro de la partoj aĉetitaj. Tamen tiu ĉi repago okazos nur post dedukto de la parto de la societano en la financaj perdoj konstatotaj per la bilanco sekvanta lian/ŝian ekŝiĝon.</p> <p>Por la kalkulo de tiuj perdoj, la societano konsultu la bilancon tian, kian ĝi estos aprobita de la Membrokunveno. La societano kiu ekŝiĝas ne rajtos sigele bloki nek aranĝi inventaron, nek nomigi juran administranton, nek ĝeni iel ajn la normalan funkciadon de la Societo. Li/ŝi ne rajtas je ia ajn pretendo pri la rezervoj de la Societo.</p>
<p style="text-align: center;"><u>Article Neuf</u></p> <p>La Société se réserve un délai de cinq ans pour procéder au remboursement des sommes à restituer. Le sociétaire qui cesse de faire partie de la Société restera tenu pendant cinq ans envers les associés et les tiers, de toutes les obligations existant au moment de son retrait.</p>	<p style="text-align: center;"><u>Artikolo Naŭ</u></p> <p>La Societo rezervas al si periodon de kvin jaroj por efektiviĝi la repagon de la repagendaj sumoj. La societano kiu ĉesas esti membro de la Societo daŭre devos plenumi siajn devojn ekzistantajn je la momento de sia retiriĝo.</p>

<p style="text-align: center;"><u>TITRE DEUX</u> <u>ADMINISTRATION et FONCTIONNEMENT</u></p> <p style="text-align: center;"><u>Article Dix</u></p> <p>La Société est administrée par un Conseil d'Administration de onze membres choisis par l'Assemblée Générale parmi les sociétaires.</p> <p>Le Conseil d'Administration est élu par l'Assemblée Générale pour 4 ans au bulletin secret. Il est renouvelable par moitié tous les 2 ans.</p> <p>Les membres sortants sont rééligibles. Mais pour la première fois, la moitié des membres est renouvelable au bout de 2 ans. Ils sont alors désignés par le sort.</p> <p>Les membres du Conseil d'administration doivent être français et jouir de leurs droits civils et politiques.</p>	<p style="text-align: center;"><u>TITOLO DU</u> <u>ADMINISTRADO kaj Funkciado</u></p> <p style="text-align: center;"><u>Artikolo Dek</u></p> <p>La Societo estas administrata de Komitato de dek-unu membroj elektitaj de la Membrokunveno inter la societanoj.</p> <p>La Komitato estas elektita de la Membrokunveno por 4-jara periodo per anonimaj voĉdoniloj. Ĝi estas reelektita duone ĉiuj 2 jaroj.</p> <p>La eksigantaj membroj estas reelekteblaj. Sed la unuan fojon, duono de la membroj estas reelekteblaj post du jaroj. Tiuj estas elektitaj per lotado.</p> <p>Komitatanoj devas esti francaj civitanoj kaj ĝui siajn civilajn kaj politikajn rajtojn.</p>
<p style="text-align: center;"><u>Article Onze</u></p> <p>Le Conseil d'Administration nomme le Bureau comprenant :</p> <ul style="list-style-type: none"> - Un Président, - Un Secrétaire, - Un Trésorier. 	<p style="text-align: center;"><u>Artikolo Dek-unu</u></p> <p>La Komitato elektas estraron kiu inkluzivas:</p> <ul style="list-style-type: none"> - Prezidanton, - Sekretarion, - Kasiston.
<p style="text-align: center;"><u>Article Douze</u></p> <p>Le Conseil d'Administration se réunit au moins une fois par trimestre. Ses décisions ne sont valables que si la moitié plus un de ses membres sont présents ou représentés. Elles sont prises à la majorité absolue des voix.</p> <p>Les délibérations du conseil d'administration sont constatées par des Procès-verbaux signés des Président et Secrétaire de séances.</p> <p>Le Bureau peut faire voter le Conseil d'administration par correspondance ou par courriel.</p> <p>Le Conseil d'Administration a les pouvoirs les plus étendus pour la gestion de la Société et peut prendre toutes les décisions utiles à la bonne marche de la Société, à charge d'en rendre compte à l'Assemblée Générale. Pour toute somme supérieure à 7 622 euros (soit 500 000 anciens francs), il devra en référer à l'Assemblée Générale.</p>	<p style="text-align: center;"><u>Artikolo Dek-du</u></p> <p>La Komitato kunvenas almenaŭ unufoje trimonate. Ĝiaj decidoj estas validaj nur se duono plus unu el ĝiaj membroj ĉeestas aŭ estas reprezentataj. Decidoj postulas absolutan plimulton de la voĉdonoj.</p> <p>La diskutoj de la Komitato estas konstatitaj en Protokoloj subskribitaj de la Prezidinto kaj de la Protokolinto de la kunveno.</p> <p>La Estraro rajtas voĉdonigi la Komitaton perkoresponde aŭ rete.</p> <p>La Komitato havas plej vastan povon koncerne la mastrumadon de la Societo kaj rajtas decidi ĉion utilan por ĝia bona funkciado, kondiĉe, ke ĝi raportu al la Membrokunveno. Por ĉiuj elspezoj superaj al 7622 eŭroj (500 000 malnovaj frankoj), ĝi bezonas antaŭan aprobon de la Membrokunveno.</p>
<p style="text-align: center;"><u>Article Treize</u></p> <p>L'Assemblée Générale a pour mission d'entendre le rapport des Administrateurs et des Commissaires aux Comptes, sur le bilan et les comptes de la Société. Elle approuve ou réprovoque la gestion du Conseil ainsi que les comptes.</p> <p>L'Assemblée générale procède au renouvellement du Conseil d'Administration et désigne chaque année plusieurs commissaires aux comptes dont un au moins pourra être choisi en dehors de la Société.</p> <p>Elle décide les augmentations du Capital, constate celles qui ont été réalisées ainsi que les diminutions.</p> <p>Elle délibère et statue souverainement dans la limite des statuts sur toutes les questions à l'ordre du jour.</p>	<p style="text-align: center;"><u>Artikolo Dek-tri</u></p> <p>La Membrokunveno aŭskultu la raporton de la Administrantoj kaj de la Konto-kontrolantoj pri la bilanco kaj la kontoj de la Societo. Ĝi aprobas aŭ malaprobas la mastrumadon fare de la Komitato kaj la kontojn.</p> <p>La Membrokunveno renovigas la Komitaton kaj elektas ĉiujare plurajn konto-kontrolantojn el kiuj almenaŭ unu povas esti ne-Societano.</p> <p>Ĝi decidas pri kreskigo de la Kapitalo, konstatante kreskojn kaj malkreskojn realigitajn Ĝi diskutas kaj decidas plenrajte, en la limoj de la statuto, pri ĉiuj punktoj en la tagordo.</p>

<p>Chaque sociétaire ne dispose que d'une voix quel que soit le nombre de parts. Nul sociétaire ne peut détenir plus de 5 procurations. Les sociétaires peuvent voter par correspondance.</p> <p>L'Assemblée ne délibère valablement que si le sixième de ses membres sont présents ou représentés. Si l'Assemblée n'atteint pas le quorum, une nouvelle Assemblée est convoquée au moins 10 jours à l'avance. (La convocation reproduit l'ordre du jour en indiquant la date et les résultats de la première réunion). La deuxième Assemblée Générale délibère valablement quel que soit le nombre des présents.</p>	<p>Ĉiu societano havas nur unu voĉon senkonsidere al sia nombro de partoj. Neniu societano rajtas havi pli ol 5 prokurojn. La societanoj rajtas voĉdoni perkoresponde.</p> <p>La Membrokunveno diskutas valide nur se sesono de siaj membroj ĉeestas aŭ estas reprezentataj. Se la Membrokunveno ne atingas la kvorumon, nova kunveno estas kunvokita almenaŭ 10 tagojn antaŭe. (La kunvoko ripetas la tagordon kun indiko de la dato kaj rezultoj de la unua kunveno). La dua Membrokunveno diskutas valide sendepende de la nombro de ĉeestantoj.</p>
<p style="text-align: center;"><u>Article Quatorze</u></p> <p>Les comptes de la Société sont arrêtés chaque année au 31 décembre. La situation financière sera établie pour être communiquée à l'Assemblée Générale et mise à la disposition de tous les sociétaires qui voudraient en prendre connaissance quinze jours avant celle-ci au siège de la Société. le cas où les bénéfices auraient été réalisés dans le cours de l'année, ceux-ci seront affectés à un fonds de développement destiné à l'extension de la Société, après prélèvement de un dixième pour être affecté au fonds de réserve obligatoire.</p>	<p style="text-align: center;"><u>Artikolo Dek-kvar</u></p> <p>La kontoj de la Societo estas bilancataj ĉiujare je la 31a de decembro. La financa situacio estos prezentita por komuniko al la Membrokunveno kaj konsultebla de ĉiuj societanoj, kiuj dezirus koni ĝin, dek-kvin tagoj antaŭ la Membrokunveno en la sidejo de la Societo. Okaze de profitoj dum la jaro, tiuj ĉi estos atribuitaj al disvolviĝo-fonduso cele al pligrandigo de la Societo, post forpreno de dekono atribuita al la deviga rezervo-fonduso.</p>
<p style="text-align: center;"><u>TITRE TROIS</u> <u>MODIFICATION DES STATUTS</u> <u>DISSOLUTION</u></p> <p style="text-align: center;"><u>Article Quinze</u></p> <p>Lorsqu'il s'agit de modifier les statuts, de dissoudre la Société ou d'exclure un sociétaire, l'Assemblée Générale ne peut délibérer valablement que si la moitié des sociétaires est représentée. Ses décisions ne peuvent être prises qu'à la majorité des deux tiers.</p> <p>Si l'Assemblée n'atteint pas ce quorum, une nouvelle Assemblée est convoquée au moins dix jours à l'avance. La deuxième Assemblée délibère valablement quel que soit le nombre des représentés.</p>	<p style="text-align: center;"><u>TITOLO TRI</u> <u>MODIFOJ DE LA STATUTOJ</u> <u>MALFONDO</u></p> <p style="text-align: center;"><u>Artikolo Dek-kvin</u></p> <p>Okaze de modifo de la statuto, de malfondo de la Societo aŭ de ekskludo de societano, la Membrokunveno rajtas decidi nur se duono de la societanoj estas reprezentataj. La decidoj de la membrokunveno validas nur kun plimulto de du trionoj.</p> <p>Se la Membrokunveno ne atingas tiun ĉi kvorumon, nova Membrokunveno estas kunvokita almenaŭ dek tagojn antaŭe. La dua Membrokunveno decidas valide sendepende de la nombro de reprezentatoj.</p>
<p style="text-align: center;"><u>Article Seize</u></p> <p>L'Assemblée Générale, aux conditions fixées pour modifier les statuts, pourra prononcer la dissolution de la Société.</p> <p>Elle nommera un ou plusieurs liquidateurs. Pendant la durée de la liquidation, les pouvoirs de l'Assemblée Générale se continuent comme par le passé ; toutes les valeurs et tous les biens mobiliers et immobiliers de la Société sont réalisés par les liquidateurs qui ont, à cet effet, les pouvoirs les plus étendus. Le produit net, après prélèvement des frais de liquidation et paiement des dettes de la Société, est d'abord affecté au remboursement des Sociétaires. ces différentes opérations laissent subsister un reliquat d'actif, celui-ci sera dévolu à une organisation espérantiste qui aura été désignée par l'Assemblée Générale.</p>	<p style="text-align: center;"><u>Artikolo Dek-ses</u></p> <p>La Membrokunveno, laŭ la kondiĉoj difinitaj por modifi la statuton, povos decidi la malfondon de la Societo.</p> <p>Ĝi nomos unu aŭ plurajn likvidistojn. Dum la daŭro de la likvidado, la povoj de la Membrokunveno daŭras kiel antaŭe; ĉiuj valoroj kaj ĉiuj moveblaj kaj nmoveblaj bienoj de la Societo estas realigataj de la likvidistoj kiuj havas tiurilate la plej etenditajn povojn. La neta produkto, post forpreno de kostoj de likvidado kaj pago de ŝuldoj de la Societo, estas unue atribuita al repago de la societanoj. Se la diversaj agoj lasas pozitivan reston, tiu ĉi estos por Esperantista organizo elektita de la Membrokunveno.</p>